

James Krüss,
Marmelado, ĉokolado

tradukita de Manfred Retzlaff

Marmeladon,³
ĉokoladon,
ĉion vendas mi!
Kaj sukeron
kaj buteron
povas havi vi!

Prem-butojn
kaj kalsonojn
trovas vi en la
magazeno.
Da fadeno
estas tiom ja!

Bird-mangĝaĵo
kaj frandaĵo,
sal' kaj gras' kaj gri',
bona pano
por la sano
estas tie ĉi!

Sinjorino
aŭ fraŭlino,
servas mi nur vin!⁴
Varo mia estu via!
Vi aĉetu ĝin!

*Traduko de la Germana poemo "Marmelade Schokolade" de JAMES KRÜSS (Jakobo Krujso, *1926-05.31 – †1997-08.02) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984-05.*

MR-083-3 / Arg-665-1335 (2012-11-21 09:33:09)

³aŭ:

Marmelado,
ĉokolado
estas tie ĉi!
Kaj sukeron
kaj buteron
povas havi vi!

⁴aŭ:

Sinjorino
aŭ fraŭlino!
Vin nur servas mi!
Varo mia
estas via,
se aĉetas vi!